

Instruado de esperanto en la lernejoj  
Personaj konkludoj  
Claude Gacond, 319-a radioprelego, 1969.11.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ofte la instruado de esperanto en la lernejoj okazas sub la signo de la demonstracio. Tiam la malfermo de esperanto-kurso ne celas la profiton mem de la gelernantoj, sed la propagandon mem de la lingvo. La rezultoj ĉiam estis senkuraĝigaj. Kial ?

A.- Ĉar la instruisto, anstataŭ rigardi al la metodologiaj problemoj, rigardas al la nepedagogiaj aferoj : la elekto de la lernolibro, de la instru-programo, la rilatoj inter esperanto kaj la aliaj branĉoj de la instru-plano, jen duagradaj problemoj. Ĉefas la rilatoj kun la aŭtoritatoj : inspektoro, lerneĵ-komisiono, kolegoj, gepatroj. Dum esperanto devus esti ilo por la profito de la infanoj, la infanoj iĝas ilo profite al esperanto.

Cl.- Anstataŭ solvi la metodologiajn problemojn antaŭ la malfermo de la kursoj per elekto de taŭga lernolibro, redaktado de kompletigaj tekstoj, trastudo de la instru-teknikoj, la instruistoj sin ĝenerale ĵetas en la instruadon de esperanto sen iu ajn antaŭpretigo : kelkfoje ili apenaŭ mastras la lingvon, ĝenerale ili nenion konas pri ties historio. Ili improvizas.

A.- Kio karakterizas la instruadon de esperanto, tio estas la tuja entuziasmiĝo de la gelernantoj. Tiu fenomeno multe helpas la instruistojn, sed samtempe ĝi erarigas ilin. Ĝi kaŝas la malfacilaĵojn, reliefigante la facilecon de la lingvo. Tamen post kelkaj monatoj la kontroloj ekmontras, ke la gelernantoj eĉ ne asimilis la ekzaktan rolon de la finiĝoj **-o**, **-a**, **-e**, **-as**, **-i** ; ke ili tute ne asimilis la korelativojn ; ke ili tre supraĵe komprenas la tekstojn mem, kiujn ili kolektive redaktis sub la gvidado de la instruisto por ekzemple la interlerneja korespondado ; ke ili ne kapablas uzi la afiksaron.

Cl.- En la instruado de aliaj lingvoj la instruantoj antaŭeniras per etaj paŝoj. En la instruado de esperanto la instruistoj tendencas fari tro grandajn paŝojn. Ili samtempe ĉion instruas. Kaj rezulte la gelernantoj malmulton asimilas.

A.- En la instruado de aliaj lingvoj la gelernantoj ĝenerale ricevas notojn. Tio devigas la instruantojn regule fari kontrolojn pri la asimilado de la gelernantoj. Tio devigas la gelernantojn vere lerni. Ĉar esperanto estas ĝenerale instruata apud la oficiala programo, la gelernantoj ne ricevas notojn kaj tial ne okazas regulaj kontroloj. Tial la instruisto ne ricevas informojn pri la asimilado de la gelernantoj.

Cl.- La pasintan semajnon vi aŭdis, ke la statistikoj de ILEI pruvis, ke esperanto estis instruata dum la lerneja jaro 1968-1969 en 500 lernejoj al proksimume 17'000 gelernantoj.

A.- Kaj ni ne forgesu, ke ĉiujare ripetiĝas tiaj nombroj.

Cl.- Ili pruvas pri la realeco de la esperanto-instruado. Sed kiam oni ekzamenas la lernolibrojn, oni ricevas plian demonstradon pri la improvisado de tiu instruado.

A.- Ekzistas kelkaj elementaj lernolibroj : *Esperanto por Infanoj* de Solomon, la *Junul-kurso* de SAT estas ĉefe konataj en la franclingvaj teritorioj. Adaptita por la lernejaj bezonoj ne ekzistas multo pli.

Cl.- Ni ekzemple vane serĉadis lernolibron por progresantoj. Tio estas pruvo, ke oni ĉefe kontentiĝas instrui esperanton al komencantoj. Jaron post jaro oni rekomencas tiun instruadon. Sed oni poste forgesas tiujn gelernantojn. Ili forlasis la klasejojn, kie okazis la instruado de esperanto kaj devas kontentiĝi ĉion forgesi.

A.- Pro tio, malgraŭ ke esperanto estas instruata en 500 lernejoj, oni fakte malmulton rimarkas pri tiu instruado.

Instruado de esperanto en la lernejoj  
Personaj konkludoj  
Claude Gacond, 319-a radioprelego, 1969.11.19 & 22

Cl.- Por ke tiu instruado bone efiku, eĉ se ĝi okazas en nedevegaj lecionoj, ĝi devus esti planita sur periodo de almenaŭ tri jaroj.

A.- En la unua jaro oni devus instrui la elementojn kaj kontroloj devus pruvi tiun asimiladon. Fine de la jaro oni devus posedi ekzaktan liston de la vortoj konataj.

Cl.- En la dua jaro, sin bazante sur tiuj konataj vortoj oni devus ekinstrui ĉu biologion, ĉu geografion, ĉu eĉ la nacilingvan redaktadon helpe de esperanto. Apud tiuj lecionoj, kiuj uzus esperanton kiel ilon, oni devus trovi lecionojn pri la historio de esperanto, kaj en perfektiga kurso la gelernantoj devus sisteme restudi la gramatikajn regulojn de esperanto.

A.- Laŭ nia scio ekzistas nenio, kiu povus korespondi al tiuj priskriboj. Povas esti, ke kelkaj instruantoj uzis esperanton por faka instruado, sed el ilia instruado okazis nenia rezulto. Ne ekzistas progresigaj kursoj. Ne ekzistas kursoj, kiuj helpas al la instruado de la naciaj lingvoj, kvankam oni ĉiam asertis, ke esperanto favoras la instruadon de la naciaj lingvoj.

Cl.- Mi mem eksperimente instruis esperanton dum ok jaroj en elementa lernejo. Kiel la ceteraj esperantistoj mi pli malpli improvizis tiun instruadon. Kaj kiam mi ekprovis instrui biologion, geografion kaj la francan redaktadon pere de esperanto, mi unuflanke ekrimarkis, ke esperanto povus multon alporti, sed aliflanke ke la pretigo de tiuj lecionoj superas la laborforton de izolita instruisto. Do mi devis rezigni pri tiu interesa eksperimento, kiun instigis la lerneja inspektoro mem.

A.- La izoleco malfavoras la progreson de la esperanto-instruado.

Cl.- Unue geografia izolateco malfavoras la kontaktojn inter la eksperimentantoj pri esperanto-instruado. Ekzemple en Svislando Olivier Tzaut, la prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando kaj mi mem ambaŭ instruis esperanton en elementa lernejo. Fakte ni apenaŭ reciproke interŝanĝis niajn eksperimentojn. Kaj ni loĝis sufiĉe proksime unu de la alia.

A.- Kiam Esperanto-Edukistaro de Svislando aranĝis kunvenon, la programo estis sufiĉe plena por malebligi sisteman kunlaboron.

Cl.- Mondskale la geografia izolateco kaŭzas la samajn mankojn. Kiam la instruistoj kunsidas dum kelkaj horoj en Internacia Pedagogia Kongreso, ili havas tiom multe da diskut-temoj kaj tiom malmulte da tempo, ke ili fakte povas apenaŭ konatiĝi. Kunlaboro ne povas rezulti el tiuj improvizitaj kongresoj.

A.- Se ĝis nun la instruistoj kontentiĝis en tiu situacio, de kelkaj jaroj oni rimarkas veran bezonon al pli taŭgaj kontaktoj. Tiu bezono kreskos, ĝis kiam ĝi kondukos al la starigo de labor-kongresoj, kies daŭro estos plursemajna kaj kies programo estos precize difinita. Tiam materialo por la instruado de esperanto povos esti redaktata. Tiam metodologio povos esti diskutata. Tiam la lernej-instancoj turnos sian atenton al esperanto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-